
# BOLETIN

## DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

AÑO XXI - Nº 260 NOV.-DICBRE. 1983

# SEVILLA, KONGRESURBO POR 1984-A



La Katedralo kun la mondfama turo «La Giralda».

**BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

Directora: María Aurora Viloria

DIRECCION Y ADMINISTRACION

Apartado 119 - VALLADOLID

REDACTOR JEFE

Salvador Aragay Galbany
Bassegoda, 40
Tfno: (93) 3338081
BARCELONA-28

COMITE DE REDACCION

Giordano Moya
Vicente Hernández Llusera
Gabriel Mora i Arana
Pedro Nuez
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutiérrez Adúriz
Andrés Martín González

# ENHAVO


| | Paĝo |
|---|---|
| Sukceso en Zaragozo | 3 |
| ILEI Konferenco en Portugalio | 5 |
| KOMUNIKADO, arto kaj teknologio | 6 |
| Raporto pri la Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Asocio «Antón Balagué» | 11 |
| Skolta Esperanto-Ligo | 11 |
| Raporto de la hispana sekcio de ILEI | 12 |
| 10-a Franca-Hispana Rekontiĝo | 13 |
| H.E.J.S.-Paĝo | 15 |
| Anekdotaro de la Zaragoza Kongreso | 16 |
| Kristnasko en la Fora Nordo | 17 |
| Hispana Poezio | 19 |
| Niaj Grupoj | 20 |
| Notas de interés para todos los federados | 21 |
| Recenzoj, recenzoj, recenzoj | 22 |
| Deziras korespondi | 23 |
| U.E.A., novaj kotizoj por 1984-a | 23 |
| Internaciaj Kongresoj kaj kunvenoj | 24 |


Depósito Legal: VA. 616.—1978
Gráf. Andrés Martín, S. A. - Juan Mambrilla, 9 - Valladolid

# UTILAJ ADRESOJ

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Apartado 119
VALLADOLID

**Prezidantino**

María Rafaela Urueña Alvarez
Avda. Ramón y Cajal, 12, 2º C
Tfno. (983) 260086
VALLADOLID-11

**Sekretario**

Luis Hernández García
Adreso kiel supre

**Kasistino**

Carmen Conde Labajo
Calixto Valverde, 8, 8º A
VALLADOLID-14

Pagojn sendu al nia Konto
Nº 001.664-0
Caja de Ahorros Popular
Ag. Urbana 6
Avda. Vicente Mortés
VALLADOLID

**Libroservanto de H. E. F.**

José González Suárez
Apartado 119
VALLADOLID

**Pagoj por libro-servo sendu al unu el la jenaj kontoj:**

**Cuenta Postal 3.118.078**

Caja de Ahorros Popular
Oficina Central
Cta Nº 042 268 4 a nombre de
LIBRO SERVO DE LA FEDERACION
ESPAÑOLA DE ESPERANTO
VALLADOLID

ELDONA FAKO
Inés Gastón
Pº de la Constitución, 35, 4º
ZARAGOZA-1

ĈEFDELEGITO DE U. E. A.
Juan Azcuénaga Vierna
Gral. Dávila, 127, portal 7, 2º Iz.
Tfno: (942) 339487
C. Postal: 03548531
SANTANDER

H. E. J. S.

Atocha, 98, 4º
Tfno: (91) 2308798
MADRID-12



**Grupo de kongresanoj antaŭ la Urbodomo de Zaragozo.**

# SUKCESO EN ZARAGOZO

Verŝajne, neniam antaŭe la partoprenantoj en la kongresoj de HEF ricevis tiom da oficialaj dokumentoj en Esperanto kiom ĉijare en Zaragozo. Temis pri tre gravaj turismaj eldonaĵoj, al kiuj aldoniĝis multvalora verko pri la riĉa historio de Aragono.

Sed, ĉi tie ne finiĝas la sukcesoj atingitaj de la modela Loka Kongresa Komitato kunlabore kun la Estraro de Hispana Esperanto-Federacio. Necesas ankaŭ mencii, ke la ekstera informado —surstrata en montrofenestroj kaj **pergazeta**— estis rimarkinda, ke la arta programo estis profesi-nivela, ke la kongresejo estis prestiĝa kaj komforta.

Siaflanke, la laboroj karakteriziĝis per vigla diskutado klimaksintaj en konkretaj rezultoj, inter kiuj la necesaj novaj kotizoj, la nova kongresa regularo, la komisiono por revizio de la dumkongresaj ekzamenoj kaj la komitato por la Jubilea Jaro. Fine, senprecedence alta nombro da eksterlandanoj kaj da gejunuloj ĉeestis la kongreson. Malpravas, do, la eternaj kritikantoj, kiuj, en la nomo de neniam atingota perfekteco, forgesas la pozitivajn aspektojn de la manifestacio kaj nur reliefigas detalajn mispaŝojn. Tiuj kritikantoj, cetere ne nur ne atentas la fakton ke la taskoj plenumendaj por organizi nacian kongreson superas la dispone-

blajn fortojn, sed ili mem malfaciligas la laboron de LKK per sia nedisciplino, malfrua aliĝo, lastmomenta kunvoko de kunvenoj kaj ignoro de la administraj informoj.

## Kial kongresi?

La Zaragoza sukceso enskribiĝas en la kadro de ĝenerala tendenco rimarkebla jam de keljaj jaroj. Fakte, se ni perspektive rigardas la lastjarajn hispanajn kongresojn, ni facile povas rimarki konstantan, eĉ relative rapidan, progreson.

Unu el la plej elstaraj rezultoj estas la iom-post-ioma spontana identigo de la fundamentaj kongresaj celoj, kiuj, laŭ ĝenerala opinio, estas konsiderataj jene:

— la kongreso celas, pere de la statutaj organoj de HEF, analizi la antaŭjaran komunan Esperanto-agadon kaj pragmatisme plani la estontan laboron:

— la kongreso prezentas ekspluatendan okazon por larĝa enurba kaj tutlanda informado por la internacia lingvo, per la amasaj inform-medioj: radio, gazetaro kaj televido.

— la kongreso akcelas —dank'al komuna kunestado kaj kunlaborado de siaj partoprenantoj-la senton de solidareco kaj frateco inter la landaj esperantistoj.

— la kongreso ebligas pli profundan konon de la vizitataj lokoj kaj kontribuas levi la kulturan nivelon de la esperantistaro.

Alia rezulto de la menciita evoluo estas la libervola forlaso, fare de la organizantoj, de ĉia improvizemo kaj anstataŭa adopto de modernaj organizaj metodoj. Tio signifas, ke hodiaŭ praktike ĉiuj konsentas ke organizi signifas unue lerni el la antaŭaj eraroj, tre frue plani, antaŭvidi la malfacilaĵojn, trovi rapidan solvon, en fleksema spirito, al novaj demandoj, akurate kaj senĉese informi la kongresanojn, intence labori kun la ĝojo kaj la plezuro, kiujn donas la sento konstrui ion socie utilan.

Estas vero, ke la supraj alspiroj estas pli facile diritaj ol realigitaj. Tamen, la supozo, ke ni latinidoj ne kapablas organizi, jam rilatas al mentalo de forpasintaj tempoj kaj ŝajnas esti rifutita de la nuntempaj faktoj. Vere, mi renkontis en Hispanio tre multajn esperantistojn kun natura organiza talento: sendube, ili multe plinombriĝos en la venontaj jaroj.

## Celo: konstanta plibonigo

Tradukante la suprajn teoriajn konsiderojn en praktikajn celojn permesu al mi mencii kelkajn personajn konkretajn punktojn, kiuj espereble iel utilos al la estontaj organizantoj:

— necesas, evidente, ke la planado de nacia kongreso komenciĝu minimume 18 aŭ 24 monatojn antaŭ ĝia malfermo. La provizora programo kaj aliĝilo estu disdonita en la antaŭa kongreso. Ĉio tio, pli-malpli, jam okazas nun:

— pli neta disdivido de la taskoj kaj respondecoj inter LKK kaj HEF povas nur esti utila. Oni povas, ekzemple, konsideri la jenan formulon, kiu estas tradicia en la Movado: la Landa Asocio preparas la laborkunsidojn, la internan informadon kaj transdonas al la Loka Komitato la kunmetitan sperton de la antaŭaj kongresoj: siavice, LKK ĉefe okupiĝas pri la kadra programo, la ekstera informado, la akceptado kaj la dokumentado kaj la loĝistikaj demandoj;

— la ekstera informado (gazetara servo) kaj la prizorgado de la junularaj aranĝoj apartenas al al organizaj ĉef-taskoj de la Loka Komitato kaj tial pri ili devus speciale okupiĝi apartaj komisiitoj;

estas dezirinde, ke la programeroj vigle sekvu unu la alian kaj ke oni evitu lasi longajn atendo horojn inter ili;

— ĉar la restado en la kongresurbo ligiĝas al la demandoj pri libera tempo kaj pri elspez-eblecoj de la partoprenantoj, estu laŭeble konsiderata la dezir-esprimo, ke la ĉefaj oficalaj labor-kunsidoj okazu sabate kaj dimanĉe, eĉ se tio kaŭzus kromkostojn;

— por limigi la nombron da lastminutaj mendoj, estus oportune skribe memorigi la fakajn organizaĵojn pri la neceso mendi salonon ĝis difinita lim-dato;

— la kongresejo plue estu komforta kiel en Zaragozo: dum la pinto de la somera varmego, klimatizo de la kunvenejoj ja ne estas lukso, sed nepra laborneceso. Aldone al tio, estus bone indiki la salonojn per nomo aŭ numero,

— por doni bonan ekzemplon al la komencantoj, la eldonaĵoj aperu en sen erara, ĝusta Esperanto. Plie, estus oportune, ke la programo menciu apud ĉiu programero ĉiujn rilantajn informojn kaj klarigojn, eĉ se ili jam aperas aliloke, i.a.; tagordon de la kunveno kun nomo kaj funkcio de la prezidanto; titolon de la prelegoj kun nomo kaj funkcio de la prelegantoj; nomo de la artaj trupoj kaj ensembloj kun titolo aŭ difino de la spektaklo (sendepende de eventuala aparta detala programo); nomon kaj adreson de la ejo aŭ, se temas pri la kongresejo, nomon de la salono, lokon, forir— kaj reven-horoj de la aŭtobusoj; horaro de la giĉetoj. Estus prudente, krome, presigi la programojn de la neoficialaj aŭ neneŭtralaj programeroj kursive, kiel faras UEA kaj la aliaj naciaj Esperanto-kongresoj.

La listo povus longiĝi laŭplaĉe, sed ĉi-tie sufiĉas indiki la kernajn punktojn.

Ne ekzistas dubo, ke la progreso ĝis nun konstatata en la organizado de la tuthispana kongreso ankaŭ estonte senhalte daŭros, ke la manifestacio rapide kreskos laŭnombre, fajniĝos laŭkvalite, fariĝos altiropunkto ankaŭ por eĉ pli multaj eksterlandanoj kaj objekto de fiereco de ni ĉiuj.

**Ĝian Carlo Fighiera**

# I.L.E.I. Konferenco en Portugalio

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj aranĝis sian 17-an Internacian Konferencon en la somera loĝloko de la portugalaj reĝoj en «la glora edeno de SINTRA» (Bvron) de la 14-a ĝis la 22-a de Julio de 1983-a.

En la konferenco partoprenis 52 personoj el 14 landoj, kiuj loĝis en tre luksa kvarstela hotelo; alia eblo ne estis donita; tio klarigas kial tiel malgranda parto de la anaro povis ĉeesti la multekostan konferencon.

La temo de la konferenco estis «Etnaj Lingvoj de Eŭropo kaj Esperanto». Prelegis inter aliaj: Helmut Sonnabend, Beril Andreasson, Theodor Wilhelm Oeste kaj Francisco Zaragoza Ruiz. Pri la Seŭla Esperanto-Movado, SO Gilsu el Koreujo projekciis lumbildojn.

Dum la konferenco okazis lingvokursoj en diversaj gradoj, kaj paroladoj de Marcelle Turin pri «La Freinet Metodo»; de Emilija Lapenna pri «La Parolarto» kaj de Mirko Emerico pri «La Nova, universala, neŭtrala kaj fonetika Esperanto-skribo» kiun oni povis ellerni dum 4 tagoj.

Kara ideo de la estraro estis interkonatigi la pedagogojn. Ĉiu ricevis 15 minutojn por prezenti sin, kaj paroli pri sia laboro.

La laborbrigadoj ellaboris instru-materialon.

Krom la laboro de la konferencanoj, oni ĝuis belegajn ekskursojn kaj kulturajn aranĝojn.

La bonegan organizadon ni povas danki al Franco Simoes.

**Orsika Kiss (Hungario)**

# KOMUNIKADO-Arto kaj Teknologio



Teatraĵo, manifestacio de arto (Foto A. Fighiera).

Nia temo estas tre multflanka; tiom multfaceta, ke ni limigu nin al la Arto kaj Teknologio, en ĝia ĝenerala aplikado, kaj —fare de Grupo Kvin— en la servo de Informado kaj Instruado.

Intence mi diras: ni limigu NIN, ĉar komunikado estas ja du-direkta! Samkiel oni ne povas aplaŭdi per unu mano, oni sola ne povas komuniki. Mi esperas ke baldaŭ ni povos konstati, ke mi ne estas nura parolanto, —kaj vi: nuraj aŭskultantoj sed ke NI interkomunikas!

Por atingi tion la parolanto estu en plena harmonio kun la personoj aŭ grupoj al kiuj li sin direktas. Ofte li devas krei kondiĉon en kiu tio, kion li volas konigi aŭ sciigi, estu facile akceptebla.

Kvankam tre laŭmoda kiel temo, la komunikado mem ne estas io nova! Male: ĝi estas samaĝa kiel la vivo sur nia planedo. Homoj —kaj bestoj ĝin daŭre aplikas, plej diversmaniere.

Sen ĝi: socia vivo ne estas imagebla.

Tra la historio de la homaro komunikado konsistis el, —kaj ankoraŭ ofte estas akompanata de —gestoj, vizaĝesprimoj, sonoj, (ĉu grun-

toj, krioj aŭ voĉoj), signaloj: fum— aŭ lum-signaloj; helpe de instrumentoj, kiel tamtamo, fajfilo, flago ktp ktp.

Precipe en la lasta jarcento la Arto kaj Teknologio kreis, —kaj oni vaste utiligas— tre potencajn rimedojn. Jen kelkaj: Telegrafo, telefono, filmo, radio, televido, videobendo, satelito, komputilo kaj multaj aliaj.

Sed, kiom ajn modernaj la rimedoj je nia dispono: la gestoj, —eble la plej pratempaj el la esprimiloj— ankoraŭ ludas gravan rolon.

Antaŭ kelkaj monatoj brita piloto de aviadilo «Harrier» sin trovis en kriza situacio: Flugante super la Golfo de Biskajo li perdis kontakton kun sia aviadilŝipo, pro malfunkcio de radio-aparato. Feliĉe lia radaro montris —per eta punkto— ke je distanco de pli ol 100 km. troviĝas ŝipo. Li konstatis ke ĝi estas malgranda, hispana kontenerŝipo «Alraigo». Pro manko de brulaĵo la piloto devis decidi —en unu minuto— ĉu surmariĝi, ĉu surŝipiĝi...!

Mi povas imagi kiel li —tra la fenestro de sia kajuto, per mansignoj petis permeson surŝipiĝi. Kaj kiel —vole nevole— la surprizita ŝipanaro aplikis la tradician, hispanan gastamecon, kaj sammaniere, denove: per gestoj, volonte donis sian permeson...

Jen, alia ekzemplo. Tio okazis en mia lerneja klaso - cetere antaŭ pli ol 60 (!) jaroj:

La aŭtoritatoj enkondukis en mian elementan lernejon la instruadon pri religio. (Saĝa decido, kaj tre interesa, ĉar la religiaj medioj de la infanoj estis tre diversaj.) Nu, post kiam la nova instruisto rakontis al ni kiel la malica serpento flustris en la orelon de Eva «ke ŝi gustumu pomon de la Arbo de Scio —pri pudoro kaj petolo», li petis al ni: «ĉu ni ĉiuj kredas ke la serpento scipovis paroli?». La levitaj manoj de ni ĉiuj pruvis ke li konvinkis nin. Nur unu, juda knabeto, ne levis sian brakon.

Je la demando: «Ĉu li ne kredas, kaj kial ne?» li respondis: «Serpento ja ne povas paroli... ĉar ĝi ne havas manojn!».

Observu kiel ankoraŭ hodiaŭ eĉ plej elokventa oratoro —tiom lerta en la lingvo-uzado— bezonas sian brakon por kvazaŭ emfazi aŭ substreki iun gravan aserton!

Sed, la ĉefa esprimilo por ni, esperantistoj, estas: lingvo. Aŭ pli bone: lingvoj. Ni bezonas niajn respektivajn naciajn lingvojn por antaŭenigi nian komunan, internacian lingvon Esperanto.

Tamen, atentu! Ne nur gravas kion ni verkas aŭ diras, sed same grava estas la formo, en kiu ni prezentas niajn komunikaĵojn! Jen kelkaj ekzemploj kiel en la nuna, tn. moderna tempo, oni ne sukcesos veki la dezirindan intereson pri Esperanto:

Jam pasis pli ol duonjarcento, en kiu malbone multobligita, iom ĉifonaspekta flugfolio taŭgis por nia celo. (Tamen, nur pasintan semajnon mi ricevis de iu brita Esperanto-Federacio bultenon... multobligitan!)

Ni atendu ke en la nuna tempo de arte desegnitaj, multkoloraj reklamiloj... nur eta unu-kolumna, nur kelklinia anonco en iu loka aŭ regiona gazeto plenigos la ejon en kiu ni preparis ekspozicieton, informvesperon aŭ provlecionon.

La lastan fojon, kiam mi vidis t. n. sandviĉulon —t.e. homo, kiu surdorse kaj fronte portas tabulojn kun afiŝon— estis antaŭ kelkaj jaroj en Hyde Park en Londono. Li anoncis ke «La fino de la mondo estas apuda». Prave, aŭ ne prave, tiaj anoncistoj estas nun rigardataj kiel «iom strangaj», ne (tute) normalaj.

Ĉu vi povas imagi kian impreson

donus eble dua sandviĉulo, kies anonco tekstus: «Esperanto savas la mondon!»?

Same eksmodaj estas la afiŝetoj gluitaj sur butik-fenestroj. Ili perdiĝas inter tiuj, kiuj instigas al aĉetado de eluzitaj aŭtomobiloj aŭ lavomaŝinoj.

Kiujn rimedojn ni jes apliku?

Se eble... la samajn kiujn aplikas la grandaj firmoj kaj produktistoj; do, la plej modernajn je nia dispono!

Tio ĝuste estas la celo de Grupo Kvin: informi kaj instrui per plej modernaj rimedoj.

Ne atendu tamen, ke tio kondukas al Tuja sukceso!

Kvankam Grupo Kvin estas tre sukcesa, unualoke en Britio —kie ĝi spertis apogon de la poste fondita Parlamenta Esperanto-Grupo, kaj de la pli posta distribuado de senpaga, 10-leciona korespondkurso— mi devas konfesi, ke malgraŭ plurjara, streĉa laboro: ankoraŭ nun troviĝas homoj en Britio, kiuj eĉ ne scias... kio estas Esperanto! Kaj ili ne nepre estas analfabetoj.

Sed, kontraŭe: La tuta mondo —ĉu oni scipovas legi aŭ ne— la tuta mondo scias kio estas... kokakola!

Kaj kvankam Esperanto estis produktita jam en la pasinta jarcento, —kaj estas multe pli nutra kaj refreŝiga... ĝi tamen ne estas sampopulara; eĉ ne samkonata!

Kial ne?!

Nu, kelkaj inter ni opinias: pro tio, ĉar ni pli malpli donacas Esperanton al iu ajn, kiu bonvolas akcepti ĝin.

Do, ni ne povas fari profiton. Pro tio ni ne havas —kaj eble neniam havos— la kapitalon necesan por grandskale kaj efike reklami nian lingvon. Sekve de tio: Ni ne povas dungi specialistojn, eminentulojn, lertajn kaj spertajn reklam-sciencistojn kaj —psikologojn, kiuj povas science esplori kiamaniere interesigi la homaron, kaj helpi konvinki ĝin pri la valoro, la utilo kaj la neceso de Esperanto! Do, laŭ ili, pro manko de mono...

Tamen: tiu manko de monrimedoj ne signifas, ke ni nenion povas atingi.

Ni ja disponas pri aliaj rimedoj.

Ni havas nian idealon, nian konvinkon, kaj plej diversajn kapablojn. Se nur ni sukcesus kunigi ilin, kaj aldoni la eble plej valorajn ingrediencojn: entuziasmo kaj dediĉo, tiam eĉ ni povus atingi konsiderindajn rezultojn!

Vivanta ekzemplo pri tio estas Grupo Kvin.

Vi mem juĝu laŭ la ĉi-sekva, mallonga priskribo de ĝia historio:

En la Londona Esperanto-Klubo —samtempulo de la Zaragoza klubo «La Frateco»— Grupo Kvin naskiĝis... naŭ monatojn post la «tre sukcesa» 56-a Universala Kongreso en Londono, en kiu mi estis LKK-ano por Reklamado. Pro mia bona sperto pri la intima kunlaboro de la tiamaj LKK-anoj —ĉiuj: membroj de la London Klubo— mi esprimis la deziron ke denove ni elektu kaj kunigu la plej kapablajn kaj laboremajn, kaj starigu konstantan agadgrupon.

Kiom bonŝanca mi estis: Juna membro, Ian Fantom, tuj pretis esti mia kuniniciatanto. Ekde la fondiĝo —pro sia ĵurnalista kvalito li estas nia inform-oficisto.

D-ro John Wells, eminenta profesoro pri fonetiko en Londona Universitato, akceptis la prezidantecon.

La financaj aferoj estas —ekde la komenco— en la profesiaj manoj de s-ino Helen Fantom.

Baldaŭ akceptis aliĝon spertulo en firmo pri grafika reklamado: Peter Oliver. Liaj desegnoj kaj grafikaj aranĝoj multe kontribuis al nia sukceso.

Meritplena kunlaboranto estas nia notul-sekretario Wilfred Atkinson.

Krom esti la organizanto, mi okaze funkcias kiel monkolektanto, sekretario kaj... pakisto en la oficejo de Grupo Kvin, kiun administras en sia hejmo: s-ino Ethel Duncan.

Komence, Ian kaj mi, verkis 5-punktan programon, elpensis taŭgajn emblemon kaj nomon. (Ĉar «punkto» kaj «pinto» en la angla estas «point», tre taŭga estis nia 5-pinta stelo kun la cifero **5**. La nomo «Grupo Kvin» bone rilatas).

Ni varbis simpatiantojn, moralajn kaj financajn subtenantojn, kaj fakajn konsilantojn. Ni **multe** uzis mian aŭton kaj precipe mian telefonon, por k.e.p. baldaŭ atingi nian celon: solenan kaj imponan inaŭguron. Tio okazis nur **6 semajnojn** poste —en la kadro de la Brita Kongreso en 1972—, en belege ornamita festsalono de reĝa palaco; la Pavilono de Brighton. Ĉeestis la Urbestro —kiun ni deklaris Honora Membro— pluraj urbaj konsilantoj, edukaj aŭtoritatoj kaj ĵurnalistoj kaj, kompreneble, la tuta kongresanaro!

Pro la entuziasmo, kiun ni kreis, niaj monrimedoj baldaŭ permesis al ni produkti Radio-kurson.

Kvankam BBC, la Brita (nacia) Brodkasta Korporacio, persiste rifuzis eĉ konsideri elsendi gin... ni tamen ne perdis kuraĝon. (Mi devas mencii ke BBC, rezulte de konstanta premo, lastatempe elsendas plurajn, tre favorajn pri-esperantajn programojn. Ĝi ne plu ignoras nian agadon!

Intertempe ni eltrovis, ke dekduo da Universitatoj en Britio havas siajn proprajn Radio-staciojn. **Nur** la studentoj funkciigas ilin kaj decidas pri la programoj.

Dum vizito al la direktoro de la federacio de Radio-staciestroj mi petis ke li invitu min al sia Jarkunveno, por tie proponi la elsendon de nia kurso en kadro de interuniversitata konkurso! Mi promesis £250 —por la plej sukcesa stacio, kaj £250— por unu el la sukcesontaj gestudentoj (laŭ lotumado).

Ili invitis min. Alveninte mi frontis aŭskultantaron de proks. cent (100) tre indiferentaj gejunuloj. Mi prelegis, ŝercis, prezentis faktojn pri Esperanto, faris mian proponon, kajolis kaj persvadis... kaj je mia surprizo: per aklamo oni akceptis!

Kaj ni: eklaboris. Ni verkis Regularon, kontrakton, bultenojn kaj varbilojn; vizitis plurajn universitatojn tra la lando, sendis kurslibrojn kaj —bendarojn, reklamilojn— ĉio k.e.p. bonaspekta kaj bonkvalita.

Dum tiu kampanjo ni alvokis la britan esperantistaron helpi nin, speciale finance! ¡Rezulte de tio mi kolektis en kelkaj jaroj pli ol 2.000 pundojn, kiuj ĵus kovris niajn elspezojn, ankaŭ pro la fakto, ke neniu en nia Grupo postulis ian ajn pagon.

Por pruvi la gravecon kaj pravecon de nia aktiveco en la universitatoj, mi menciu la nomojn de kelkaj mondkonataj gvidantoj en nia Novado: Duncan Charters, Diccon Masterman, Victor Sadler, Graham Leon Smith, Humphrey Tonkin, John Wells.

Ilia unua Esperanto-Klubo estis tiu de la Universitato Cambridge! (Granda, plurpaĝa artikolo pri ĉi tiu kampajnjo aperis en la revuo «Esperanto» de majo'74.) Tamen, tia kampanjo ne povas daŭri eterne; studentoj daŭre kaj rapide ŝanĝiĝas. Ĉiujare ni devis ekrilati kun malsamaj homoj! Tio postulis amason da tempo, energio - kaj mono.

Do ni turnis nian atenton al alia moderna rimedo, kiu tiutempe rapide populariĝis: la kasedbendoj. Intertempe ni kompletigis nian Radio-

**kurson** per «Jen Nia Mondo 2», kaj **decidis** eldoni ĝin kiel kompletan Radio-Kased-Kurson en fortika, belaspekta teko. Ni aldonis al ĝi vortaron kaj legomaterialon. Per celtrata reklamado, nia Komunikado fariĝis sukcesa.

Nia kurso nun troviĝas ne nur en la hejmoj de memstudantoj, sed ankaŭ en multaj lingvo-laboratorioj kaj bibliotekoj. Eĉ en la Biblioteko de la Brita Parlamentejo!

Grupo Kvin kaj Jen Nia Mondo fariĝis pli kaj pli populara, ankaŭ en ĉiuj angle parolantaj landoj. Radiostacio en Perth, ĉefurbo de Okcident-Aŭstralio, dum jaroj elsendas ĝin. Agadgrupo en Usono petis permeson nomi sin «Group Five-USA» (Grupo Kvin-Usono). Tre interese: en Ĉikago ĝi estas aŭdebla... per **tele**fono, tagnokte!

**De** multaj landoj venis petoj por tranduki nian kurson. Eĉ de pursanga Indiano el la popolo Ĉeroki, **por** (kaj mi citas:) «por redoni al sia popolo ĝian perditan memfidon kaj -estimon».

JNM jam aperis en traduko en itala, islanda, dana kaj sveda lingvoj.

¡Bedaŭrinde ni —ankoraŭ— ne ricevis novaĵon ĉu iu intencas traduki ĝin en la hispanan lingvon!

* * *

Ĉar fine G5 komencis enspezi monon, ni nun pensas pri kreado de pli moderna versio de nia kurso.

**Televido** estas pli moderna, sed pli ambicia.

**Video-kurso** estas alia ebleco. La ideo estas altira, tamen: videa-kurso **estas** tre altkosta, temporaba kaj —por trovi taŭgan merkaton— ni frontos, kaj devos solvi, grandajn problemojn, pro la nenormigo de sistemoj.

Tute nova teknologio —kiu ĝuste nun eksplodas— estas la **komputilo**. Unu versio estas la **hejma** komputilo. Ankaŭ uzata en lernejoj; ofte kun registara subvencio. Ĉu ni transpaŝu la teknologion de video, kaj eniru rekte la komputilan mondon? Post la unuaj kostoj pro programado, la kostoj de produktado estas —relative— malaltaj. Ni menciis la avantaĝon de maksimuma uzado de la telefono. La teknologio jam nun ebligas al homoj kontakti... komputilojn! Nia informoficisto —kiu estas profesie scienca informoficisto— regule telefonas al... komputiloj en Usono, Italio kaj Britio por havigi al si informojn!

Nun pliiĝas eblecoj fari same per hejmaj komputiloj, je nealtaj kostoj. (Micro 800 - telefonreto).

Ekzemple ni povus dissendi al ĉiuj komputiloj en la reto informojn pri Esperanto, kun invito partopreni komputilan kurson.

Por **imagi** tion, oni devas eble forte streĉi la **imagpovon**; tamen: la ebleco venas - kaj venas rapide.

Konklude:

Ni vojaĝis de la pratempo al la epoko de la komputiloj; (ni iom haltis en la periodo de la multobligiloj).
Ni ankaŭ venis de la simpla uzado de la telefono al... uzo de telefono por imagstreĉe informi; kaj instrui Esp-on.

Malgraŭ tio, ke nia Movado estas iom malnovmoda, uzante malnovajn rimedojn, ni nun havas **seriozan** eblecon ŝanĝi tion, kaj transsalti subite —tre subite— en la 21-an jarcenton de Nia Mondo!

**Peter Schilperoord**
**(Britio)**

# Raporto pri la Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Asocio «Antón Balagué»

En la kadro de la 43-a Hispana Kongreso de Esperanto, okazinta en Zaragoza de la 21-a ĝis la 25-a de Julio 1983-a, okazis la ĝenerala kunveno de Hispana Esperanto-Asocio «Antón Balagué».

La 22-an de Julio, vendredon, je la 9,20 h. la Prezidanto k-do Luis Serrano Pérez malfermas la kunvenon, kiun partoprenas deko da membroj inkluzive de k-do William Gilbert, Ĝenerala Sekretario de M.E.M. (Mondpaca Esperantista Movado). K-do Faustino Castaño, sekretario, legas raporton pri la agado de la Asocio en la jaro 1982-a. Oni aprobas ĝin.

Poste okazas vigla diskutado, kiun laŭorde partoprenas ĉiuj ĉeestantoj, dum kiu oni reliefigas la nepran bezonon batali senĉese por atingi PACO-n. Pro la nunaj gravaj internaciaj cirkonstancoj, oni devas konsciigi ĉiujn esperantistojn kaj la tutan popolon pri la neceso kontraŭstari militon. Okaze de nova Mondmilito, dum kiu oni nedubeble uzos la lastajn eltrovaĵojn, la teruregajn amasmortigilojn, kies stokoj nur en la du grandaj nuklearmitaj landoj, sufiĉas por kelkfoje detrui la tutan homaron; ja je kio servos niaj klopodoj por Esperanto samkiel pri io ajn?

La Prezidanto proponas etajn sanĝojn en iuj artikoloj de la Regularo de H.E.A. samkiel plialtigo de la kotizoj, kiuj estas aprobitaj.

K-do William Gilbert anoncas ke li estas komisiita transdoni po unu honorinsigno de MEM al la kamaradoj Domingo Cebollero kaj Faustino Castaño, al kiuj estis atribuitaj pro iliaj meritoj. Sekvas la solena kaj emocia momento de la surbrustigo de la insignoj, kiujn la honorataj k-doj videble kortuŝite dankas.

Kun tiu ĉi akto finiĝas la kunveno. Oni adiaŭas sin kun promesoj pri daŭra kaj senĉesa batalado por PACO, kontraŭ milito kaj vetarmado.

**Adonis González Meana**

# SKOLTA ESPERANTO-LIGO

En la jaro 1918-a estis fondita de la angla skolto Alexander William Thomson la Skolta Esperantista Ligo, hodiaŭ Skolta Esperanto-Ligo. La celoj de S.E.L. estas, inter aliaj, konigi la skoltajn idealojn al la esperantistoj kaj Esperanton al la geskoltoj.

En Hispanio, la ideo estis bone akceptita, kaj multaj hispanaj geskoltoj membriĝis al SEL. En la jaro 1927-a okazis en Valle de Oza (Huesca) la 6-a Internacia Tendaro de SEL kun multaj partoprenantoj kaj granda sukceso. S-ano Pedro Marqueta estis la hispana impulsinto.

Poste, okazis la hispana milito, la skolta movado estis malpermesita... kaj nia sekcio de SEL ĉesis ekzisti.

Nune, la Skoltado denove fukcias en Hispanio, ĝi estas la plej multenombra junulara movado kun pli ol 50.000 membroj.

Dum jaroj, s-ro Salvador Aragay, eĉ ne estante skolto, subtenis SEL, nun feliĉe SEL trovis novan skoltan reprezentanton en nia Lando kaj nia sekcio povas renaskiĝi.

Plie ILEI ofertas senpage, kursojn pri Esperanto por korespondado al ĉiuj geskoltoj; fakte, iuj jam lernas Esperanton.

Se vi estas skolto membriĝu al SEL kaj kontaktu kun la nova hispana reprezentanto de SEL, s-ro Luis Gilpérez Fraile, Apartado 7.131 Sevilla.



**Gelernantoj de la Elementa Kurso kun s-ano Zaragoza.**

# Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

(Hispana Sekcio)

## RAPORTO PRI LA LERNOJARO 1982-a-1983-a

La pasinta lernojaro finiĝis plena da laboro kaj kun la espero de novaj kaj gravaj agadoj. Fiere, ni povas diri ke nia Sekcio, per sia aktivado, per siaj korespondaj kursoj, estas la motoro kiu disvastigas Esperanton, eĉ al la plej kaŝitaj lokoj de nia lando, dank'al la sindonemo de niaj amikoj kaj simpatiantoj.

Nia membraro daŭre kreskas kaj nun ĝi konsistas el 439 membroj, cifero kiun ni esperas pligrandigi ĉar ankoraŭ estas multaj esperantaj profesoroj kiuj ne apartenas al nia Sekcio.

Nia laboro estas, konstante, apogata de pluraj E-Grupoj kaj unualoke de la Hispana Esperanto-Federacio kaj de pluraj gazetoj inter ili: «GUIA» de Madrid, «INTEGRAL» de Barcelona, k.t.p.

Ni aktive partoprenis en la Rekontiĝo de la valenciaj esperantistoj okazinta en Elda, sub la gvidado de s-ino Joaquina Aguado kaj prezidita de sia moŝto la Urbestro kun partopreno de esperantistoj de Castellón, Valencia kaj Alicante. Ankaŭ ni partoprenis en la H.E.J.S. Tendaro okazinta en la Esperanto-Oazo, situanta proksime al Gandía, kiu kompetente funkcias sub la gvidado de s-ano Aquiles Sanz.

Kiel kutime niaj membroj aranĝis elementajn kursojn de Esperanto, ĉefe en la Publikaj Lernejoj kie ili profesie laboras.

Aliflanke, niaj korespondaj kursoj daŭre progresas. Tiel la Elementa Kurso sub la gvidado de Direk. Vicente Molins atingis 2.019 aliĝintojn kaj la Supera Kurso, gvidata de s-ro Bernabeú Franco havas, proksimume, 200 gelernantojn. Por helpi tiujn samideanojn kiuj loĝas izolitaj, nia Sekcio havas gravan kaseton-servon.

Okaze de la Internacia Jaro de la Komunikado ni eldonis 5.000 flugfoliojn kaj 2.000 faldaĵojn de la teksto de Claude Piron «La Comunicación Lingüística» kiu estis amase akceptita.

Fine, mi devas mencii la eldonon de la broŝuro titolita «LA INSTRUADO DE ESPERANTO LAŬ LA REKOMENDOJ DE LA UNESKO» kies aŭtorino estas D-rino Maria Rafaela Urueña, Prezidantino de H.E.F. kaj Prof. pri Internacia Juro en la Universitato de Valladolid.

(Resumo de la raporto sendita al la membroj de la sekcio)

F. ZARAGOZA RUIZ

NOVA SEKCIESTRO.—S-ano Andrés Martín González de Málaga estis nomumita nova sekciestro de la Hispana Sekcio de I.L.E.I. Al li ni deziras sukceson en sia aktivado.

# 10-a FRANCA-HISPANA REKONTIĜO

Kun ĉiam renovigita entuziasmo pasis la 10-a Franca-Hispana Rekontiĝo. Ĝi apartenas al tiu vico de renkontoj organizitaj de la esperantistoj de ambaŭ flankoj de la Pireneo.

Ĝi okazis de la 23-a ĝis la 25-a de septembro en Pau, ĉefurbo de l'Béarn, organizita de la Grupo «ESPERANTO Pau-Adour» al kiu ni devas danki pro la bona organizado, kaj gratuli pro la sukceso atingita.

Ĉijare en la kadro de la Renkontiĝo okazis grava evento, nome: Inaŭguro de Parko ZAMENHOF; ĝi okazis sabaton, la 24-an posttagmeze. La esperantistoj de Zaragoza ekveturis al Pau tiun saman tagon, je la kvara matene, per komforta aŭtobuso. Kiam ni alvenis ĉe la landlimo ektagiĝis; tra Somport ni eniris en la Valon de Aspe, de ĉiu konata sed por ĉiu nova. Ĝia serena beleco kontrastas kun la majesta beleco de nia Pireneo. Post longa veturado ni alvenis al Pau tagmeze.

La Sociala Centro de la Pépiniere, kies 10-an datrevenon oni festas ĉijare, inter alie, estas sidejo de la loka Esperanto-Klubo, «ESPERANTO Pau-Adour». De tie, akompanataj de S-ino Decobert ni iris al Junulhejmo, kie devis okazi komuna tagmanĝo. Tie, ni renkontiĝis kun niaj francaj geamikoj kaj alvenintaj la 23-an, kaj inter ili kun nia kara amiko, membro de HTES, fidela partoprenanto en tiuj ĉi renkontoj, S-ro Otaola el Bilbao. Intersalutoj, babilado, ĝojo de la revido igis la etoson plej amikeca kaj agrabla.

Je la 16-a okazis la Oficiala Inaŭguro de la Parko ZAMENHOF. Dum la tondado de la flagrubandoj Franca kaj Esperanta, fare de la Reprezentanto de Lia Moŝto la Urbestro, kaj malkovro de la tabulo, kiu donas nomon ZAMENHOF al la Parko, kolomba klubo ekflugigis kolombaron. Tuj poste, la Reprezentanto de la Urbestro diris kelkajn vortojn pri la decido nomigi la parkon ZAMENHOF, kaj nia samideano Roberto Lloamcy, per belega parolado informis la multnombran publikon pri la personeco de D-ro Zamenhof kaj lia verko la Internacia Lingvo Esperanto. Tondra aplaŭdado premiis ambaŭ intervenojn.



**Medalego kiu ornamos la skvaron L.L. Zamenhof en Pau: ĝi montras la figuron de la juna doktoro kiu donis junan lingvon al la mondo por ĉiuj gejunuloj. Ĝin skulptis J. P. Dubois.**

Finiĝinte la oficiala aranĝo, kaj post vizito de la parko, ni translokiĝis al la sidejo de la Klubo «Esperanto Pau-Adour», kie en ĝia korto, la lokaj klubanoj regalis nin per refreŝigaĵoj kaj frandaĵoj.

Post vizito al ĉefaj vidindaĵoj de la urbo ni translokiĝis al Gan, kie okazis la komuna vespermanĝo. La reganta entuziasmo pli kaj pli kreskis dum la manĝado en tiu agrabla etoso, sed la tempo rapide pasas kaj ni devis reveni al Pau, kie atendis nin en la «Hogar de España», kie okazis folklora festo fare de la Grupo de Ĥota de Puente Montañana (Huesca). Por ni estis agrabla surprizo ĉar ili bonege dancis kaj kantis.

Jam estis noktomezo kiam ni eniris en la Universitaton por tranokti en ĝia Restadejo.

Dimanĉon, je la 11-a, okazis Oficiala Akcepto de la esperantistoj en la Urbodomo de Pau. Bonvenigis nin Lia Moŝto la Urbestro André Labarrere, amiko de Esperanto kaj Ministro pri rilatoj kun la Parlamento, kiu tre afable kaj simpatie kuraĝigis nin daŭrigi en nia laboro. Lia Urbestra Moŝto kaj ceteraj Magistratanoj ĉeestantaj tostis kun la renkontiĝantoj por la sukceso de nia idealo. Nome de la Hispana Turisma Esperanto-Sekcio ni donacis al la Urbestro memorigan medalon okaze de la Oficiala Inaŭguro de Parko ZAMENHOF.

Post kiam ni dankis al la Urbestro lian akcepton kaj regaladon, ni lasis la Urbodomon kaj translokiĝis al restoracio en Gelos, kie okazis komuna manĝado en vere frata etoso.

La, ni diru «oficiala programo» estis finita, sed same la francaj kiel la hispanaj rekontiĝantoj ne estis pretaj akcepti la finon tiel simple, do, kelkaj el niaj francaj geamikoj akompanis nin ĝis Bedous, survoje al Hispanujo.

Unue ni haltis en Oloron, kie ni vizitis la Katedralon, belega artkonstruaĵo konsiderata kiel unu el la plej gravaj monumentoj de la gotika stilo en la regiono de l'Béarn. Ankaŭ ni haltis en Sarrance, ĉi lasta, vilaĝeto situanta sur monteto apud rivero. Ĝi estas celo de pilgrimantoj al Sanktejo de Virgulino Maria de Sarrance. Ĉi tiu vilaĝeto famiĝis jam en la jaro 1387, kiam la Reĝoj de Béarn, Navarra kaj Aragón, tie kunvenis por pritrakti siajn problemojn kaj ordigi ilin.

Informitaj de la esperantistoj de Pau, ke ni intencis halti en Bedous, je nia alveno al la urbo, ni estis akceptitaj de S-ino Urbestr-edzino, (li ne estis en la urbo) akompanata de urba Konsilantino, kiuj akompanis nin kaj en preparita aparta salono regalis nin per bonegaj vino kaj fromaĝo. La simpatio kaj afableco de niaj gastigantinoj lasis en ni senton de frata amikeco.

Alvenis la momento de la adiaŭo, kiu por ni estas nur ĝis revido en Hispanujo. Mi ne povas ankoraŭ precizigi pri la urbo. Mi esperas ke ni povos informi pri ĝi en proksima numero de BOLETIN. Krome, la Klubo «ESPERANTO Pau-Adour» en Francujo kaj la Hispana Turisma Esperanto-Sekcio restas je via dispono por informi al ĉiuj interesitoj.

**Inés Gastón**

ESPERANTO Pau-Adour,
Centre Social de la Pépiniere
6-8 avenue Robert Schumann
F-64000 PAU

Hispana Turisma Esperanto-Sekcio
Pº de la Constitución 35-4º dcha.
ZARAGOZA-1

# MUY IMPORTANTE

Se recuerda que las cuotas de la Federación Española de Esperanto han sido publicadas en el anterior número de BOLETIN y que el pago de las mismas puede hacerse:

A la cta Nº 001.664-0, Caja de Ahorros Popular, Ag. Urbana E VALLADOLID.

A la cta. postal Nº 3.118.078 de Valladolid, mediante giro postal en el que se haga constar el motivo del pago.

Mediante talón bancario extendido a nombre de la Federación Española de Esperanto.

Rogamos encarecidamente se efectúe el pago de las cuotas en los primeros meses del año, con el fin de evitar el envío de cantidades ingentes de REEMBOLSOS, como ha ocurrido en años anteriores, que ocasionan un enorme trabajo extra.

De antemano, MUCHISIMAS GRACIAS por vuestra colaboración.

LA TESORERA


Kelkaj gejunuloj kiuj partoprenis en la Zaragoza Kongreso.

# H.E.J.S.-Paĝo

Intensa agado estis la karakterizo de la junulara partopreno en la Hispana Kongreso de Esperanto en Zaragozo. La estraro de H.E.J.S. partoprenis ĉiujn gravajn kunvenojn kaj defendis diversajn junularajn proponojn, kiuj plejmulte sukcesis. La zaragoza junularo multe helpis la tenon de la kongreso per teatraĵo, la publikigo de ĉiutaga informilo, k.t.p.

H.E.J.S. aktive partoprenis la unuan Andaluzan Esperanton Kongreson kies ĉefa organizanto kaj vera animanto estis nia Sekretario s-ro Rodríguez. Dum ĝi okazis densa laborkunsido pri la venonta H.E.J.S.-Tendaro okazonta Paske en Kordovo.

Kelkaj el niaj membroj, inter ili s-anino Ana Maria Ranero, partoprenis la Internacian Junularan Kongreson okazinta en Debrecen (Hungario). Gravas informi ke Armi Wandel estis anstataŭita kiel Prezidanto de T.E.J.O. de Ian Jackson.

H.E.J.S. aktivis dum la somero per granda ekstermovada propagando. La prezidanto de H.E.J.S. estis intervjuata de la aragona regiontelevido kaj partoprenis kun aliaj estraranoj kelkajn radioprogramojn en Madrido. Nia simbolo aperis en kordova ĵurnalo, kaj nia sekretario kaj la eksredaktoroj de «HEJS-JUNECO» parolis radie en Kordovo, Zaragozo kaj Madrido. Ankaŭ nia delegito en Seviljo parolis en nacia programo pri Esperanto.

**Junulo**

# Anekdotaro de l

En ĉi tiu artikolo mi klopodos montri kelkajn kuriozajn, simpatiajn aŭ kortuŝajn aspektojn okazintajn aparte de la oficialaj kunsidoj kaj diskutoj.

**ĜENTILECO DE LA ZARAGOZA POPOLO.**—Tio estas ja pruvita de la fakto mem, ke pluraj lokaj E-istoj gastigis aliajn el diversaj provincoj, aŭ de la natura sin oferemo de la Zaragozaj samideanoj. Sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo abundis ekzemploj de la spontanea helpemo. Jen rakonto pri tio:

Iun vesperon mi vidis vicon da senmovaj aŭtomobiloj. La trafiklumo estis verda, sed la unua veturilo ne ekveturis. La stiristo staris sur la ŝoseo kaj klarigis ion al sinjoro, kiu portis mallongan pantalonon kaj fotilon. Post sekundoj aliaj aŭtomobilistoj sonigis la hupon. Tiam la unua stiristo turnis la kapon kaj diris laŭte: «Bonvolu ne perdi la paciencon, ĉar mi respondas la demandojn de turisto, kiu ne konas la urbon». Ĉiuj komprenis kaj silentis dum li daŭrigis sian klarigon.

**AVENTURO EN TIPA KAFEJO.**—«EL PLATA» estas grava distra institucio de la urbo. Ĝia aspekto estas tiu de malmoderna, duonpura, dekadenca kantkafejo kie du iom dikaj junulinoj, akompanataj de tri lacaspektaj muzikistoj kantas humorajn malicaĵojn kaj tradiciajn hispanajn kanzonojn. La publiko de tiu eksterordinara kaj samtempe aminda loko estas la tuta Zaragozo: infanoj, gefianĉoj, emeritoj, artistoj... ĉiu sentema persono, kiu kapablas vibri kun la magia sorĉo de ĉi tiu unika etoso.

Grupo da junaj gekongresanoj ĉeestis la spektaklon. La tradicio postulas, ke la publiko partoprenu. La mistera hazardo rezervis surprizon al la esperanta samideanaro. Du madridanoj (la prezidanto de HEJS kaj mi) estis invititaj de la artistinoj kanti kaj kiseti ilin, kio estis honteme kaj dece plenumita de ni inter gajaj komentarioj kaj bruaj fajfadoj de la publiko.

**PARTOPRENO DE DU AKADEMIANOJ KAJ HAZARDA VORTLUDO.** S-roj de Diego kaj Régulo Pérez ĉeestis la kongreson kaj afable respondis demandojn pri ĉio ajn: Akademio, Literaturo, tradukarto, vivspertoj, k.t.p. Iun tagon, s-ro Régulo, moderiganto de diskutado, konstatis etan malkonsenton pri kelkaj punktoj de la debato kaj, por mildigi la diskuton, li diris ke oni devas interpreti ĉiun ajn dokumenton ne laŭvorte, sed laŭspirite, kaj ke pro tio li normale ne multe favoras normojn. Do tiam kreiĝis kurioza kaj hazarda vortludo: s-ro Régulo ne ŝatas regulojn.

**ANEKDOTO KUN KOREA ESPERANTISTO.**—Pro la amasa kaj alloga propagando farita de la L.K.K., multaj eksterlandaj samideanoj venis al Hispanio, kio donis al la Zaragoza Kongreso etoson internacian. Unu el la plej popularaj eksterlandanoj estis nia korea samideano s-ro So, kiu aranĝis lumbildan prezentadon pri sia lando kaj disverŝis ĉien simpation kaj bonan humoron. Iun vesperon li multe amuziĝis per la lernado de «falsaj amikoj» inter la hispana lingvo kaj Esperanto. («falsaj amikoj» estas vortoj kun sama formo sed malsimila signifo en la du lingvoj). Post klarigo de kelkaj: «tio», «falo», «puto» «rostro»... Mi diris al li ke lia nomo. So, en la hispana estas prepozicio kaj ankaŭ estas voĉo per kiu oni haltigas la azenojn. Nia orienta amiko multe ridis je tio kaj respondis, ke en korea lingvo «So» signifas «malrapida» kio estas eco de la azenoj.

# la Zaragoza Kongreso

**SENHONTILO.**—Kun tiu nomo la gejunuloj de Zaragozo eldonis ĉiutage novstilan, kritikan kaj originalan revueton plenan de komentarioj, humoraĵoj, anekdotoj, kaj vivspertoj el la kongreso. Tiu senprecedenca ideo, vigle apogata de la partoprenantoj meritas ripetiĝi en venontaj kongresoj. Laŭ mia opinio, ĝia kreo pruvas la lertecon kaj maturecon de la gejunuloj de la grupo kiu certe celtrafis per sia elpenso kaj provas ke la novaj generacioj niveliĝas al la veteranaj je konoj kaj iniciatoj.

**ĤOTOJ EN ESPERANTO.**—Ĥoto estas la tradicia dancebla kanto de Aragono. En la kadro de la kongreso la L.K.K. plene sukcesis aranĝante artan vesperon de tipa regiona folkloro. La trupo «El Baluare Aragonés», fame diskonata en la tuta lando, faris belegan prezentadon, kiu emociis la ĉeestantojn. Por fini sian belan spektaklon, la grupo de artistoj kantis ĥotojn, tradukitajn en Esperanton de aragona esperantisto, Jen la tekstoj de du el ili:

Mi demandis anĝeleton
pri la paradiza vojo
kaj li diris «sekvu Ebron,
haltu vin en Zaragozo»

Punis homan fierecon
Dio per Babela Turo
sed la lingvo zamenhofa
liberigis nin de l'puno

**Juan Carlos**

# KRISTNASKO EN LA FORA NORDO

Imagu altĉielan nordan pejzaĝon, kie la neĝo jam ĉion kovris per brile diamanta tolo. Vi vojaĝas en la kamparo kaj la abioj ŝajnas rideti desub la blanka ŝminko, iom komplice, kiel por diri: «Vi vidas ja, baldaŭ estos denove Kristnasko».

Kaj en la urbo, ĉio estas ĝojo.

La ruĝo estas la kristnaska koloro, kaj ĝi feste elstaras ĉie. Ĉe la fenestroj, vi vidas gigantajn neĝkristalojn el ĉiu ebla materialo, ĉefe vitro aŭ ligno, kaj grandajn stelojn pendantajn el la plafono. En la steloj oni povas meti kandelojn kaj tiel havi vere laŭokazan lampon, sed ili belas eĉ sen lumigo. Krome nenie mankas la kristnaska boko el pajlo, kun ruĝa rubando ĉekole, kiu personigas antikvan forton de la naturo kaj bonaŭguras por la venanta jaro.

La finnoj atendas kun ĝojo la «Rad-feston», kies origino estas ege pli frua ol la kristanismo. La nomo «Joulu», kiu indikas Kristnaskon, venas fakte el la sveda «Jul», rado. Kial «rado»? Ĝi aludas al la cirkla iro de la suno, kiu dum unu jaro «ĉirkaŭiras» la teron kaj okaze de la vintra solstico revenas al la sama loko, tiel kompletigante la «radon». Por la paganoj tiu ĉi estis ŝoka esprimiĝo de la fortoj de la naturo, nome de la dioj, kaj pro timo kaj espero ili komencis festi la solsticon kiel unu el la plej gravaj eventoj de la jaro. Kompreneble, la kutimo povis longe daŭri ĉe popolo ĉefe agrokulturema, kaj kiam oni trudis al ili kristanismon la finnoj ne rifuzis festi la... kutiman feston, sub alia nomo.

Kaj ne formortis la legendoj: ek-

zemple, tipa popola mito en Skandinavio estas ke, se dum la nokto de Kristnasko oni nude promenas tra la kampoj, la postan tagon oni vidos blondi la grenon. Eĉ pli poezie, sed kun tima nuanco, oni rakontis ke dum tiuj noktoj la bestoj parolas la homan lingvon, kaj el riveretoj fluas mielo anstataŭ akvo. Sed kiu tion vidos aŭ aŭdos la bestojn, tiu fariĝos el ŝtono, kiel taŭgas al aŭdaculoj kiuj tro volas enmiksiĝi en la diajn misterojn.

Sed ni revenu al la nuno. Jam dum la tuta decembra monato la finnoj organizas etajn antaŭfestojn, nomatajn «Pikku Joulu», eta Kristnasko. Taŭgas ĉiuj pretekstoj por multigi la festetojn: ĉiu klubo havas la sian, estas tiu de la instruistoj kaj tiu de la lernejanoj, la ĝenerala de la lernejo kaj la apartaj de la opaj klasoj, la eta kristnasko inter geamikoj aŭ kolegoj aŭ najbaroj ktp. Mi forte suspektas ke estas iu Pikku Joulu ankaŭ por la ĝisostaj malamikoj, kiuj malgraŭ la sentoj ne volas malprofiti plian okazon por antaŭ festi la Kristnaskon. Dum la festetoj oni multe ridas, kantas, manĝas kristnaskajn kuketojn kaj interŝanĝas etajn donacojn. Fakte Pikku Joulu estas iaspeca «ĝenerala provo» por la tri tagoj de la vera Kristnasko.

Fine ĉi lasta reale venas, kaj la dommastrinoj, kiuj jam multe trejniĝis, donas la plejbonon de si mem por la bankedo de la 24a vespere, kompreneble ne neglektante la 25an kaj 26an. Estas diversaj bongustaj specialaĵoj, fiŝoj kaj pasteĉoj, sed la plej okulfrapa kaj frandinda estas kompleta porka kokso, bakita en speciala krusto dum multaj horoj, ĝenerale dum tuta nokto. La viando tiel preparita havas guston ege delikatan kaj tute apartan: malgraŭ la komuna bazo ĝi neniel similas el kuirita ŝinko, sed estas multe pli fajna. La fantazio de la dommastrinoj libere kuras inter klasikaj receptoj kaj pli ekzotikaj specialaĵoj, sed nenie mankas la biskvitoj en formo de stelo kun pruna marmelado en la centro.

La infanoj, kiel ĉie, atendas siajn donacojn. Kaj ilin portas la «Frosta Koboldo», ĉarma vireto kun ruĝa pinta ĉapo, ornamita per tintilo. Li ne estas sola, sed havas multajn kunulojn, kiuj venas piedpinte dum la nokto, por plenumi sian ŝatatan devon. Tial estas oportune lasi por ili sur la tablo kelkajn kukojn kaj fruktojn, por ke ili sentu la dankemon de la hejmo kaj reprenu kun nova forto sian vojon al pliaj bonaj infanoj... kaj plenkreskuloj.

La koboldoj —ne senmotive, kiel ni vidis— estas tre ŝatataj en Finlando kaj multaj gajaj kantoj priskribas ilian alvenon kaj la emocion kiu tenas la infanojn ilin spionantajn. Jes, kristnaskaj kantoj abundas en ĉi tiu neĝa sed tute ne malĝoja lando. De la himnoj en preĝejo, kun **kantele**-akompano (nenio pli elstara ol kristnaskvespera diservo, eĉ por nekredantoj!) al la klasikaj lidoj (inter la kontribuo de famaj komponistoj, kiel Sibelius, daŭre plej karas al finnoj la «Kristnaska kanto de Sylvia» de Topelius, kortuŝa alvoko de ekzilitino al sia patrujo), por fini per la plimalpli tradiciaj melodietoj, kiujn ĉiuj entuziasme kantas kune. Tiom entuziasme ke la finnaj esperantistoj tradukis la plej konatajn, por kunkantigi la klubanojn okaze de la Esperantaj «Abiaj Festoj», kaj ne nur tiam. Ne nur la ruĝaj koboldetoj rolas en la kantoj, sed la naturo daŭre plej gravas, tiu naturo kiu kristnaske prezentiĝas kiel «somero en vintra vesto», pro la ĝojo kiun ĝi disdonas al la koroj. Jen simpla, iom naiva sed kortuŝa atesto pri la profunda fido de la finna gento en naturo rigora, sed amika kaj senfine bela.

**Perla Martinelli**

# HISPANA POEZIO

## Al unu viro granda-naza[1]

Pri viro temas, apendic' de nazo,
pri nazo temas, ja superlativa,
pri alambiko temas, duonviva,
pri spado-fiŝo de aĉ-barba klaso,

pri sun-gnomon' el sek-miena bazo[2],
pri elefanta rostro suprendriva,
pri jud-skribista naz' imperativa,
pri turpa-naza Ovidio Naso[3].

Kiel galera pruo ĝi majestas,
kiel egipta piramido spita...
La dek du nazo-tribojn ĝi sugestas[4].

Nazulo kun flarilo infinita,
lia enorma protonazo estas
livida perniego ulcerita.

**Francisco de Quevedo** (1580-1645)

El la hispana:
F. de Diego

1. Probable, unu el la multaj sarkasmoj de Quevedo kontraŭ lia arkirivalo, la fama poeto Luis de Góngora (1581-1627), kies nazo ja grandis, kaj kies originon Quevedo suspektis juda.

2. Góngora havis miskreskintan barbeton kaj frid-aspektan, acidan vizaĝon.

3. Aludo al tio, ke Góngora inspiriĝis el la versoj de la latina Ovidio Naso kaj, laŭ Quevedo, tre infris rilate sian modelon.

4. La dek du triboj, kiuj konsistigis la hebrean popolon.

# NIAJ GRUPOJ

**CASTELLDEFELS** (Barcelona).—La 17-an de Septembro oni inaŭguris en la «Domo de la Kulturo» tre interesan ekspozicion pri Esperanto, montrante librojn, gazetojn kaj diversajn esperantaĵojn. La saman tagon, je la 7,30 vespere, d-ro Petro Nuez prelegis pri «La problemoj de la homaro kaj la lingvistika problemo».

Aliflanke, kaj aŭspiciata de la Kultura Patronato de la Urbokonsilantaro de Castelldefels, s-ano Fernández Jurado gvidas, ekde la monato oktobro, elementan kurson de Esperanto.

Gravan artikolon pri Esperanto oni aperigis en la bulteno «Butlleti de Castelldefels» nº 47 de septembro 83-a.

**BARCELONA.**—En la sidejo de Barcelona Esperanto-Centro, la 4-an de Decembro la Jurio publikigis la premiojn de la Internacia Literatura Konkurso «Ramón Molera», kiu estis starigitaj por omaĝi al nia eminenta kaj karmemora samideano, membro de nia Centro, forpasinta la 28-an januaro.

**HOSPITALET** (Barcelona).—S-ano Narcis Fluvia gvidis kurson de Esperanto, okazinta unuafoje en ĉi tiu urbeto en la Asocio «Ateneu de Cultura Popular», Krom la kurso oni aranĝis Esperanto-ekspozicion kaj prelegon de s-ano Salvador Aragay.

**GERONA.—La E-Grupo «Ĝirona Espero»** komencis eldoni en la nuna jaro 1983-a, revuon titolitan «La Grilo» kies enhavo estas interesa, ĉar krom novaĵoj pri Esperanto kaj pri la esperantista movado, aperas aliaj temoj de la urbo mem de ĝenerala intereso.

**MADRID.**—Kiel ĉiujare, la Centra Oficejo de H.E.F., strato Rodríguez San Pedro, 13, komencigis Elementan Kurson okazanta lunde kaj vendrede je la 8-a vespere gvidate de f-ino Francisca J. Yruegas.

La ĵaŭdoj, je la sama horo, ĉiu federaciano kiu deziras paroli en Esperanto povas ĉeesti kunsidon tie okazanta. La samideanoj loĝantaj for de Madrido kiuj deziros viziti la Centran Oficejon profitante vojaĝon al Madrido, povas fari ĝin je la menciitaj tagoj kaj horoj, aŭ kontakti telefone al la telefonnumero 4468079, kaj ĉiuj estos bonvenaj.

## NOTO

Ni informas ke estonte en ĉi-tiu rubriko, ni nur aperigos raportojn senditajn de la koncernaj respondeculoj de ĉiu Grupo, al la ĉefredaktoro de «BOLETIN».

La kunlaboraĵojn, sendotaj tuj post la okazigo de la koncerna aranĝo, devas esti tajpitaj je duobla spaco aŭ almenau skribitaj tre klare.

# GRAVA NOVAĴO

S-ano José María González Aboín, kartografo kaj ekssekretario de H.E.F., partoprenis kiel reprezentanto de Hispanio en la«4-a Konferenco por la normaligo de la geografiaj nomoj» okazinta en Ĝenevo (Svislando). La menciita konferenco havas kiel celon adopti unikan nomon por tiuj montoj, riveroj, k.t.p. internaciaj, tio estas, kiuj apartenante al du aŭ pli da landoj, aŭ trapasante ilin, ests konataj per diversa nomo en ĉiu lando.

Nia samideano proponis adopti internacian lingvon, kiel Esperanto, kiel neŭtralan solvon.

En la konferenco, kvankam momente ne akceptita, la propono estis registrita en la Aktoj sen malfavora opinio.

# ŜI TRANSPRENIS LIAN TORĈON

S-ino Ana Maria Molera de Illa, filino de nia neforgesebla semideano Ramón Molera Pedrals, akceptis la taskon de komisionanino en la «PREMIO KLARA SILBERNIK». S-ino Molera transprenis la postenon, kiun dumvive okupis sia karmemora patro.

# Modificaciones al Directorio

### ALTAS

ALMERIA, 2.705 García Quiñonero, Francisco Salvador; Tirso Molina, 19.
VERA (Almería), 2.706 Martín Cuadrado, Alejandro; Cortijo El Real.
BARCELONA, 2.700 Figueras Bartolomé, Joaquín; Valencia, 603 d.p.
BARCELONA, 2.708 Montaner Llorens, José; Dante Alighieri, 93 d.p. 32.
CASTELLAR DEL VALLES (Barcelona), 2.704 Soldevila Saladich, María, Maestro Ros, 20.
MOYA (Barcelona), 2.702 Illa Molera, Montserrat; Enrique Rubio s/n.
BURGOS, 2.703 Caballero Yuste, Alfredo: Concepción, 6-2º-B.
HUELVA, 2.711 Pérez Norte, José; Alfonso XIII, 16.
LIERGANES (Cantabria), 2.710 Hossany, Ismael; Velasco, 31.
SORIA, 2.709 Ruiz Ceruel, María Avelinda; Tarrasa, 5 1º M.
VALENCIA, 2.701 Keefe, Dennis Edward; Dr. Gómez Ferrer, 13 d.p. 10.
ASTRABUDUA-ERANDIO (Bilbao), 2.707 Díaz Oña, Iñaki; Consulado de Bilbao, 29.
GUERNICA (Vizcaya), 2.699 Moriones Arés, Francisco José; Lorateguieta, 24.
MALAGA, 2.698 López Castilla, Rafael; Corregidor F. Molina 18 dp 6.

### CAMBIOS DE DOMICILIO

CHESTE (Valencia), 2.631 Cortés García, Armando; Carretera C-3.322, Km. 3/77 (junto Puente del Chalet).

# RECTIFICACION AL DIRECTORIO

Por error involuntario en la numeración de los **Socios Vitalicios**, se comunica que el número 26-bis corresponde a D. Francisco Azorín Poch, de Madrid, que es socio vitalicio de la Federación Española de Esperanto.

# INFORMA FAKO DE H.E.F.

Kun la celo reorganizi ĉi tiun gravan servon, s-ano Enrique Piquero, de Zaragoza volonte akceptis gvidi tiun-ĉi fakon.

Ni petas al ĉiu E-Grupo kaj al unuopaj esperantistoj, la sendon de eltranĉaĵoj aŭ fotokopioj de informoj (artikoloj, raportoj, intervjuoj k.t.p.) aperintaj en ĵurnaloj, revuoj, k.t.p. ĉu favoraj, ĉu nefavoraj al Esperanto. Sendu viajn eltranĉaĵojn al: s-ro Enrique Piquero Vázquez; Asín y Palacios 8-6º A, ZARAGOZA-9.

# RECENZOJ, RECENZOJ, RECENZOJ

ANATOL, de Arthur Schnitzler. Tradukita de d-ro Leopold Grimne, d-ro Karl Beakmann, Hugo Kraus kaj Grete Breunlich. Eldonejo: Aŭstria Esperanto-Instituto. •

Kvankam la titolo estas tiu de la Anatol-Ciklo, ja ĉi tiu broŝuro enhavas nur kvin el ok unuaktaĵoj kiuj ĝin konsistigas. Ĝia aŭtoro, Arthur Schnitzler (Vieno 1862-a-1931-a), medicina doktoro, praktikadis la karieron dum pluraj jaroj ĝis li ĝin forlasis definitive por sin dediĉi al la literaturo. Tamen, lia profesio influis grave sur lian verkadon, pleje en la psikologian studon de ĝiaj herooj. Ĉe ANATOL (1890-a) aperas, tute klare, la karakterizoj de lia beletro: aserto de la malebleco komunikiĝi, erotika etoso kaj korinklino al la akravideco kaj al la eleganteco de la frazo. Formal-vidpunkte, ĉiu-tiu verko, kaj pli malfrue REIGEN, LIEBELEI, DER GRÜNE KAKADU kaj LA VERDA PAPAGO, estas direktitaj al la nuntempa teatro. Plie, taŭgas rimarki, ke, en ĉiu unuaktaĵo, la aŭtoro aperigas, krom Anatol kaj lia kunulo Maks, virinojn kiel la mediumon Kora, la sopiritan sed jam edziniĝintan Gabriele, la flirteman Bianka, la «sinceran» Ani aŭ la ĵaluzan Ilona. Aliflanke, la unueco de la Ciklo evidentas, kaj samtempe ĉiu epizodo memstaras. Anatol, tra siaj intimaj kontraŭdiroj, vekas en la leganto grandan intereson, ĉar, iel, niaj plimalpli oftaj travivaĵoj speguliĝas en ĉi tiu verko. Kiu ne enamiĝis iam? Kiu ne estis tentita forlasi sian amat(in)on kaj, poste, tuj sin regis kaj venkis la malordan inklinon? Kion povus diri ĉiu el ni pri la flirtado? Amo estas la motoro de la Vivo, tio estas certa. Tamen, ĉar ĝi estas fondo de energio, necesas ĝin kontroli. Ne sufiĉas, por justigi nian agojn, la neceso liberigi nian libidon, sed, kontraŭe, nepras konduki sin mem laŭ superaj moralaj normoj. Tial, ĉi tiu verko ne konsilindas por personoj nehavantaj klaran kaj aŭtentikan moralan kriterion.

Cetere, ANATOL de A. Schnitzler estas tre interesa literaturaĵo, ĝia traduko meritoplenas kaj, tial, ni certigas amuzan kaj instruan legadon al ŝatantoj de gravaj esperantaĵoj.

ANDRES MARTIN

UKRAINAJ POPOLAJ FABELOJ. Eldonis B.E.A. Tradukis N. H. Adrianova. 79 paĝoj 155 x 225 mm. Ofsetpresita.

La 22 fabeloj, kiujn enhavas ĉi tiu libro estas vere interesaj, ĉar en ili estas koncentritaj spertoj de la popolo dum jarcentoj, iliaj revoj, pensoj kaj aspiroj. Tiuj rakontoj allogas kaj ravas ne nur infanojn, sed ankaŭ plenaĝulojn kaj meritas esti konataj de ĉiuj.

La skribmaniero rezultas iom stranga, ĉar la tradukinto ne konstruas la frazon laŭ la kutima vortordo, li uzas multe la finaĵojn -e kaj -n kaj malmulte la prepoziciojn, sendube pro influo de la gepatra lingvo. Jen malgranda ekzemplo el la fabelo «Anasineto-Lamulineto».

«.—Iru ni, edzino, en la arbaron fungojn kolekti.

Do venis ili la arbaron. La maljunulino kliniĝis por fungon preni kaj subite vidas: en la arbusto estas nesto kaj tie anasineto sidas»,

JUAN NAVAREÑO

# DEZIRAS KORESPONDI

Lernanto 14-jaraĝa kun junaj esperantistoj el la tuta mondo. Kolektas ĉion pri faŭno kaj floro (p.m., b.k., diapozitivoj, albumoj, k.t.p.). Krzystof Piotrowski; ul. R. Kocha 1 A; **PL-51.122 WROCLAW** (Pollando).

Pri poezio, popolarto, slojdo, ĝardenlaboro, 25-jaraĝa, F-ino Malgorzata Popialkiewicz; ul. Strzelecka 17 m 19; **PL-61.846 POZNAN** (Pollando).

Komencantino, 20-jaraĝa, pri diversaj temoj. F-ino Khol Erika; Petofi ut. 73 **6.500 BAJA** (Hungario).

Pri edukado, verkado kaj lingvo, prof. Richard Swerdlin; North Texas State University, P. O. Box 13.857-NTSU Station; **DENTON**, Texas 76203-3857 (USONO).

## Universala Esperanto-Asocio

# NOVAJ KOTIZOJ POR 1984-a

| | |
|---|---|
| MJ Individua Membro kun Jarlibro | 960 p-tojn |
| MA Individua Membro-Abonanto (ricevas Jarlibron kaj revuon Esperanto) | 2.400 p-tojn |
| SA Abono al la revuo ESPERANTO | 1.440 p-tojn |
| Kto. Abono al la revuo KONTAKTO | 720 p-tojn |
| DM Dumviva membro de U.E.A. pagas por la tuta vivo en unu fojo | 60.000 p-tojn |

**KLARIGOJ.**—Kotizintoj kiel MJ, MA kaj DM ricevas dum oni ankoraŭ estas malpli ol 26-jara la revuon «Kontakto» sen plia pago; por tiuj naskiĝdato estas nepre bezonata.

Kotizintoj kiel MJ MA kaj DM ricevos ankaŭ Katalogon de la Libroservo de U.E.A.

## KOLEKTIVA ABONO AL «KONTAKTO»

Mendante 10 abonojn al la revuo «KONTAKTO» sendotaj al la sama adreso, oni pagos nur 2.880 p-tojn, tio estas oni ĝuas 60% da rabato de la normala kotizo.

Pliajn informojn petu al la ĉefdelegito de U.E.A. en Hispanio, Juan Azcuénaga Vierna, Gral. Dávila 127 port., 7 2º izda. SANTANDER.

## GRAVA NOVAĴO RICEVITA DE LA ĈILIA ESPERANTO-ASOCIO

Per letero sendita al ni, de S-anoj Iván Mättig, kaj Jorge Tachauer, Prezidanto kaj Sekretario de Ĉilia Esperanto-Asocio, ni sciis la gravan novaĵon ke nun ili estis akceptitaj, kaj havas sidejon en la Ĉilia Instituto pri Hispana Kulturo, kies Direktorino agnoskas la gravecon de nia movado.

La Prezidantino de H.E.F. skribis leteron al S-ino Antonia Goyenechea, Direktorino de la Instituto pri Hispana Kulturo gratulante ŝin pro tiu agnosko de la kultura agado de esperanto, kaj dankante sian bonvolemon rilate al la Ĉilia Esperanto-Asocio.



# INTERNACIAJ KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ

## Internacia Renkonto de Infanoj

Okazonta de la 1-a ĝis la 8-a de aprilo 1984-a Kursoj, redaktado de staĝo-gazeto, distraĵoj, diskutrondo pri lingvo-instruado.
ESPERANTO DOMO, Gresillon; 49.150 BAUGE (Francio).

## 6-a Porpaca Kunveno

En **Pardubice**, kiu situas 100 km. oriente de Praha ĉijare **okazos** la 6-a Porpaca Kunveno de geesperantistoj kaj simpatiantoj de Esperanto. La aranĝo okazos de la 23-a ĝis la 25-a de marto, en la **Kultura Domo Dukla**, kaj la programo entaŭvidas altnivelan kulturan programon kaj distraĵojn.
ĈEHA ESPERANTO-ASOCIO: Jilska 10; 110 01 PRAHA 1 (Ĉekoslovakio)

## Internacia I.C.E.M.-Renkontiĝo

La internacia I.C.E.M.-renkontiĝo (Kooperativa Instituto por Moderna Lernejo) okazos en nord-orienta parto de Francio, inter Nancy kaj Strasbourg, en bela kamparo, meze de arbaroj kaj lagetoj, apud Vosges-montaro, de la 8.ª gis la 19a de julio 1984. Sin turni al Paul Poisson, 239 rue Víctor Hugo, St-Cyr-sur-Loire-37100 Tours. Francio.

## 69-a Universala Kongreso de Esperanto

Okazonta en **Vankuvero**, Brita Kolumbio, Kanado de la 21-a ĝis la 28-a de Julio 1984-a.

La kongresejo por la 69-a U.K. apartenas al la **Universitato** de **Brita** Kolumbio, kies tereno ampleksas kvin kvadratajn kilometrojn **de gazono**, parkoj, studentaj loĝejoj kaj pedagogiaj konstruajoj.

Nia kongresejo ampleksas tri turojn por loĝado kunigitaj pere de koridoroj al centra administrejo. Ĝuste tie troviĝos la giĉetoj, la libroservo kaj registrado.

Por aliĝoj, kontaktu kun s-ro Juan Azcuénaga Vierna de Santander, kiu estas la Peranto por Hispanio de la Universala Kongreso.

## Antaŭkongreso en Montrealo

De la 14-a ĝis la 20-a de julio, la Kebekia esperantistaro **kore invitas** vin turistumi dum unu semajno en **Montrealo**.

Montrealo sidas meze de la Sankta Laurenco riverego, kaj estas metropola urbo en Kanado, kiu famiĝis pro la Mondekspozicio okazinta en 1967 a. Informojn petu al Z/d: Louise Labelle; 10617 Oscar, Montrealo, Kebekio, Kanado HIH 5J8.